

№ 6 (78)

Junio 1915.




*Redakcio kaj Administracio: Moskvo, Lubjanskij projezd, 3.  
„La Ondo de Esperanto“,  
monata gazeto.*

Цѣна 15 коп.

Unu numero 15 sd.







# LA ONDO DE ESPERANTO

VII jaro.



VII jaro.

## ВОЛНА ЭСПЕРАНТО

Junio 1915.

№ 6 (78).

Jarabono 2 rubloj = 2,12 sm. Подписная плата 2 руб. въ годъ.	Adreso de la redakcio kaj administracio: 3, Lubjanskij projezd, Moskvo, Ruslando. Telet. 149—00.	Tarifo por anoncoj: 1 linio . . . . 25 kop. = 27 sd. Тарифъ для объявленій: 1 строка петица . . . . 25 коп. Передъ текстомъ 35 коп.
---	---	---

### Avizo de la redakcio

La manuskriptoj ne enpresitaj estas resendataj nur se oni aldonis la resendkoston.  
La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.



St. Kvapil

(Zaporojje-Kamenskoje, Rusl.)

Sekretario de Esperantista Societo en Zaporojje-Kamenskoje, unu el la plej agemaj Esper. Grupoj en la nuna tempo.



A. G. Ternikova

(Voronej, Rusl.)

Malnova kaj fervora esperantistino, diplomita de Moskva Instituto de Esperanto.



LA REDAKCIO DE „LA ONDO DE ESPERANTO“ (Moskvo, Lubjanskij projezd, 3.) PETAS LA LEGANTOJN SENPROKRASTE REABONI LA GAZETON POR LA JARO 1915. LA ABONPAGO ESTAS 2 RUBL. JARE.

## IOM PLI DA TOLEREMO KAJ PACIENCO!

La artikolo en la № 3 de nia ĵurnalo «La milito kaj paco», okupinta neintence la fruntan lokon, venigis al ni multajn protestajn kaj aprobajn leterojn. Kelkaj, erare opiniante, ke la artikolo prezentas parton de la oficiala redakcia programo, kulpigis nian gazeton je ŝovinistaj tendencoj, kelkaj je la nekristanaj, kelkaj konsilis forbruligi tiun kajeron, kelkaj malkaŝe diras, ke «se ekzistus en Ruslando alia neŭtrala Esperanta gazeto, ili tuj nepre transirus al ĝi». Unuvorte, kiom da abonantoj, tiom da opinioj kaj deziroj. Tio estas tute natura. Sed kion fari? Kiamaniere devas esti kondukata la gazeto, kiu, estante nun sola en la tuta grandampleksa lando, povus kontentigi almenaŭ plimulton da legantoj?

En la ordinara vivo tio estas atingata per multo da presorganoj: ĉiu elektas la gazeton, kies programo al li plej plaĉas. La esperantistoj ankoraŭ ne povas liveri al si tian lukson. Simile al la malriĉaj vilaĝanoj, vole-nevole loĝantaj dekoje kaj dudekoje en unu malgranda ĉambro, ni dume estas devigataj enfermi niajn spiritojn en malvastajn kadrojn de sola dekspaga monata ĵurnalo. Ne estas do mirinde, ke en tiu dometo okazas tre oftaj kaj multaj konfliktoj kaj malagrabloj. Eviti ilin oni povas nur sidante tute trankvile kaj senmove, aŭ, — se ni diros konkrete — restante tute neŭtralaj, t. e. plenigi nian ĵurnalon per

fabeloj, fabloj, rakontoj, pastoraloj, anekdotoj k. t. p.

Tiaokaze ni neniun tuŝos, neniun maltrankviligos, neniun nevole ofendos... Sed anstataŭe ni baldaŭ konvinkigos, ke «akvon senmovan kovras putraĵo». Ni tute ne deziras, ke tio okazu kaj ni vidas nur du elirojn el la malagrable situacio: aŭ la esperantistoj devas fondi kelkajn presorganojn kun klare difinitaj programoj — politikaj, religiaj, k. t. p., aŭ eldoni gazeton, kiu prezentus kelkajn paĝojn al libera tribunalo. Tiuj paĝoj estus kvazaŭ parlamento, kie oni povas aŭdi parolojn de ĉiu partio. Kaj tiam neniun povus postuli forbruligon de tiu aŭ alia kajero, ĉar forbruligo de parlamento estas konsiderata en ĉiu leĝaro tre grava krimo.

Bedaŭrinde la nuna tempo ankoraŭ ne favoras la fondon de novaj esperantaj gazetoj. Por ke la nova gazeto pli aŭ malpli firme stariĝu, oni devas posedi ĉe la fondo almenaŭ kvin milojn da spesmiloj, multon da libera tempo kaj grandan ĵurnalistan sperton. Do restus dume la dua eliro, t. e. la enkonduko de nova fako «Libera Tribunalo». Sed la vojon baras la ekzisto de speciala cenzuro \*) dank'al la milittempo. Ni petas la legantojn konsideri la nunan situacion kaj memori pri la «cirkonstancoj ne dependantaj» de la Redakcio. Iom pli da toleremo kaj pacienco!

A. S.

## GERMANA LINGVO KAJ ESPERANTO EN FRANCUJO.

En la francaj liceoj aŭ gimnazioj, laŭ la reformprogramoj de la 1902 jaro, oni donas ses jarojn por la instruado de la germana lingvo, de la sesa ĝis la unua klaso.

Ĉiusemajne estas kvin horoj da instruado, al kiuj korespondas kvin horoj da lernado. Ĉar la instruado daŭras naŭ monatojn ĉiujare, dum ses jaroj tio faras proksimume sumon da 2000 horoj. La francaj lernantoj, almenaŭ la liceanoj aŭ koleĝianoj, liveras do 2000 horojn por lerni la germanan lingvon. Multaj el ili havas plie fremdajn

instruantojn, pasigis sian libertempon en Germanujo, aŭ ricevas privatajn lecionojn; aliaj havas instruistinojn germanajn kaj ankoraŭ sekvas la vesperajn senpagajn kursojn, subvencitajn de la urbaj kasoj.

Rezultato: niaj liceanoj ne konas la germanan lingvon, eceptante unu aŭ du el cent.

\*) Tiukaŭze ni ne povis presigi la jam ricevitajn leterojn kaj devis limigi nin per la nuraj citaĵoj.

R. d.



\* \*

En la vesperaj kursoj, ĉie kie iniciatemulo trovas ĉambron, ne ĉiam tre bone lumigatan nek tre bone varmigatan, kaj kelkajn bonvolajn aŭskultantojn, oni donas *unu horon* ĉiusemajne por la helpa lingvo de Zamenhof, la Esperanto-lingvo.

La lerna nttoj estas laboristoj, oficistoj, instruistoj, plej ofte nur malmultaj. Necesa estas ia kuraĝo, post dek aŭ dekdu horoj da laboreja, oficeja aŭ instrueja laboro, por reiri la lernejon kaj intenci la pligrandigon da siaj konoj.

La Esperanta kurso daŭras dekkvin aŭ dudek semajnojn, de oktobro ĝis aprilo. Kelkaj forlasas la aferon, ĉar ili vidas, ke por lerni Esperanton, ili devas antaŭe koni la francan lingvon, kaj ĉar ili konstatas, ne sen miro, ke ili ne konas sian gepatran lingvon. La plej multaj persistas ĝis la fino, mirigitaj de la simpleco, la logiko, la facileco senkomparaj de la nova lingvo.

Rezultato: tiuj laboristoj, tiuj oficistoj, post dekkvin aŭ dudek lecionoj, konas Esperanton.

\* \*

Per Esperanto ili posedas la mirindan ŝlosilon, la ĉionmalfermantan ŝlosilon, kiu ebligas al ili la interrilatojn kun la Esperantistoj de la tuta mondo. Ĉiuj aŭskultantoj formas la publikon, venintan el ĉiuj partoj de la mondo, kiu sin retrovas en la ĉiujaraj Esperantaj Kongresoj, kaj ili konstatas, ke Esperanto, en Francujo lernita, estas tute la sama Esperanto, kiun parolas Japanoj aŭ Novzelandanoj. Ĉiam ili komprenas la taŭgecon kaj la valoron de Esperanto, kaj ili fariĝas ĝiaj fervoraj propagandistoj kontraŭ la malfervoremo aŭ la ridemo de la malbone sciigitaj samtempoj.

Ĉiuj samtempoj, malamikoj de Esperanto, resumas sian tutan kontraŭstaron per la du jenaj asertoj:

1) La vera internacia lingvo estas la franca lingvo.

2) Lernu la fremdajn lingvojn, kiel eble plej multajn fremdajn lingvojn.

Tamen, mi demandas min mem, kiamaniere franco, akceptinte la unuan aserton, povas ankaŭ akcepti la duan. Se la franca lingvo estas vere la internacia lingvo, mi ne bezonas, kiel franco, lerni la fremdajn lingvojn.

En Francujo, de 1880 ĝis 1900, oni multe skribis en la gazetoj kontraŭ la klasikaj

lingvoj, la greka kaj la latina, fundamentoj de la franca kulturo, kaj por la eksterlandaj, nuntempaj lingvoj, pli utilaj en la praktika vivo. La rezultato estis la famaj programoj de 1902, kiuj forigis la grekan lingvon, preskaŭ forigis la latinan, kaj treege malpligrandigis la instruon de la franca lingvo. Multan, troan tempon oni donis al la fremdaj lingvoj, precipe al la germana. Kaj bedaŭrinde, oni elektis la Berlitzan metodon, kiu hodiaŭ evidente aperas tute netaŭga por kultura instruo.

Pro la ricevitaj kaj ĉie konstatitaj rezultatoj, en la gazetoj kaj libroj ekaperas multaj artikoloj kaj opinioj malamikaj al la lernado de la eksterlandaj lingvoj, kiujn sufiĉe bone esprimas tiuj kelkaj linioj de Marcel Prévost, sur la paĝo 336 de «Les Anges Gardiens»:

— Do, diris Croze stariĝante, ni devas forlasi, ke niaj infanoj lernu fremdajn lingvojn?

— La manko ne estus grava, — diris la prefekto, ankaŭ stariĝante.—Kiom fremdan lingvon vi parolas?

— Neniun. Sed...

— Nek mi ankaŭ. Tamen ni sufiĉe bone sukcesis, vi kaj mi. Kaj Mercadieux havas en sia oficejo, po cent frankoj ĉiumonate, maŝinskribistinon, kiu tute flue parolas angle, germane kaj france»...

\* \*

La ĉiam pligrandiĝontaj internaciaj rilatoj igas pli kaj pli necesa la solvon de la lingva problemo.

Tiu solvo estas en Esperanto. Tio estas la firma kredo de kelkaj miloj da kleruloj kaj eminentuloj, firma kredo starigita ne per abstraktaj aŭ teoriaj rezonoj, sed per konkretaj kaj praktikaj spertoj ĉe la Esperantaj Kongresoj.


La ministroj, kiuj en ĉiu lando regas la sorton de la publika instruado, devas sendube plenumi ĉiutage multajn taskojn, ŝajne pli urgajn. Ilia devo tamen estas koni kaj utiligi, por la plej granda profito de ĉiuj, la novajn fortojn kreitajn de la homa genio.

Esperanto estas unu el tiuj fortoj.

H. Muffang.

R. du Fresne, Angers. (Franclando).

(Traduko ĉiulingven permesata. Nur oni bonvolu sendi nacilingvajn tradukaĵojn al la verkinto).





## Esperanto en Ruslando.

*Mallongigoj:* E=Esperanto, E-a=Esperanta, E-e=Esperante, E-istoj=Esperantistoj, S-to=societo, P=prezidant (ilo)  
Vp=vicprezidant (ino), S=sekretari (ino), K=kasist (ino) B=bibliotekist (ino), R=revizor (ino), Kt=komitatan (inu)  
Datoj novstile, monatoj romcifere.

**Moskvo.**—Prezidanto de Moskva Societo Esperantista s-ro R. G. Mencil (redaktinto de «La Ondo de Esperanto») nun estas oficirigita kaj jam sendita al la fronto.

**Petrogrado.**—Nun en s-to «Espero» estas elektita nova komitato: prezidanto A. Kremlev, vicprezidantoj-s-ino E. Nozikova kaj kapitano V. Prejs, kasisto-Loman, sekretarioj P. Koliŝko kaj A. Dokina, komitatanoj Bogdanoviĉ, Kusanikov, Norejko, Romanov, Ŝavinskij kaj Volk.

La 1-an de Majo en s-to «Espero» s-ro Koliŝko faris raporton pri propagando de Esperanto. Debatojn partoprenis s-inoj Nozikova, Ŝiŝko, Dokina kaj s-roj Kremlev, gvardia s.-leŭtenanto Sakoviĉ, Kalinin, Romanov k. a.

P. Ko.

**Kiev.** — La vica tekoncerto okazis la 27—V ĉeeste de 50 personoj. Programon, komencitan per «La Espero», partoprenis s-ino Kondrackaja, leginta pri «Unuaj jaroj de E.», s-ro Traĉevskij, parolinta pri «Italujo kaj E.», fr-ino Feoktistova (piano), s-ro Kontranjeviĉ (basaj arioj), s-ro Polak (dek-lamo) kaj s-ro Tamarov (piano).  
Votra.

**Saratov.**—Korespondanto de «La Ondo de Esp.» s-ro G. Fedulov memvole soldatiĝis.

**Astrahan.** — 24 — IV ĉe societejo komiza okazis ĝenerala kunveno de Astr. S-to Esper., kie post akcepto de kelkaj novaj membroj s-ro S. Sariĉev faris raporton: «Esperanto dum milito». Krome, oni decidis aranĝi du literaturajn konkursojn de Esperanto inter lokaj geesperantistoj kun premioj: unu konkurso—traduko el la rusa kaj la dua—Esper. originalaĵo.

— Astr. Gejunula Esper.-Rondeto nun kuniĝis kun loka gimnastika rondeto «Sparta» kaj ili ambaŭ de nun nomiĝos «Gimnastika Esperanta Rondeto «Sparta». Ĉiuj membroj estas devigitaj lerni Esperanton, kies kurson gvidos s-ro M. Kabakov.

— Esper. lernolibrojn oni nun vendas en magazeno de Vinnikov, en centro de l'urbo.

— Ĉi-tie loĝas kiel civila militkaptito maljuna esperantisto S-ro Füller (aŭstria regato), kiu donacis al biblioteko de A. S. E. kelkajn esperantaĵojn. Krome, la societon

vizitis s-ro I. Semizorov (el Svencjani) kaj s-ro I. Bajkov el Kineŝma.

— Dum antaŭnelonga vizito de lokaj komercaj klasoj la Regiona Inspektoro, parolante pri Esperanto, esprimis bedaŭron, ke ne en multaj komercaj lernejoj oni instruas Esperanton. Astr. S-to Esp. kun granda plezuro sendos afiŝojn pri Esper. de Astr. Komercioj Klasoj al ĉiuj personoj, kiuj volos liveri ilin al komercaj lernejoj de aliaj urboj.  
S.


**Kostroma.** — La 8-an de Majo okazis ĝenerala kunveno de l'Societo. Priparolinte tre vigle kelkajn demandojn de l'interna vivo, la kunvenintoj aŭskultis raporton de l'prezidanto P. Rozanov je la temo «La akra demando, kiun oni ne povas solvi per la flikaĵoj» (ruse). La saman raporton enprenis loka gazeto «Povoljskij Vestnik».

La 30-an oni ekskursis trans la riveron Volgo kaj fotografiĝis. La promenado estis gaja kaj vivplena.  
P.

**Zaporozje-Kamenskoje** (Jekat. gub.) La 13-an de Junio loka Societo Esperantista aranĝis en «Fabrika Aŭditorio» koncerton-spektaklon kun filantropia celo.

Oni prezentis ruslingve 1-aktan teatraĵon «Por la Patrujo» de Auslender kaj 1-aktan komedieton «Sufragistino» de Vermiŝev. Ambaŭ spektaklojn reĝisoris s-ro F. Orlovskij. Poste sekvis koncerto, kiu konsistis el kantado, deklamoj kaj muzikludado; en la lasta partoprenis prezidanto de S-to s-ro B. Radzinski. La multaj ĉeestintoj, inter kiuj estis ankaŭ invititaj la vunditoj de lokaj lazaretoj, per bruaj aplaŭdoj inde rekompencis la partoprenintojn de spektakloj kaj koncertoj. Estis enkasigitaj 88 rubl. 45 kop. Diversaj elspezoj faris sumon 33 rubl. 08 kop. kaj la pura resto de 55 rubl. 37 kop. estis transdonita al loka komitato de helpado al familioj de militantaj laboristoj de Dnjepra metalurgia fabriko.  
Strato.

**Orel.**—Direktoro de privata gimnazio, s-ro A. A. Nedbal, konsentis malfermi Esper. kurson, ne sole vintran, sed ankaŭ someran. La kursojn gvidos s-ro Vs. Basov.





## Esperanto en eksterlando.

**Britujo.** — La brita esperantistaro jam kolektis la necesan kapitalon por donaci al la Ruĝa Kruco duan aŭtomobilon-ambulancon «Esperanto» № 2. — Vigla propagando estas farata en la konata Hyde-Park (Hajdparko). — En Edinburgo estas malfermita somera lernejo de Esp. — En Burnley post la komenco de la milito enskribiĝis por la Esper. kursoj 140 novaj lernantoj. Nun dek kursoj funkcias. — La nova Eklezia Ligo Esp. jam havas pli ol 140 membrojn — anglikanajn pastrojn.

**Francujo.** Kun permeso de l'estraro s-ro Demarcy en Beauvais faris priesperantan paroladon antaŭ 300 soldatoj. S-ino Ferter faris samteman paroladon en Lagny. Inter la ĉeestintoj estas notinda 108-jara esperantisto, kiu publike deklaris, ke Esperanto estas plej granda karaĵo de lia vere multjara vivo.

**Italujo.** — D-ro Stromboli aranĝis sukcesan paroladon «Esperanto kaj milito» en la Popola Universitato de Genova. P-ro De Gobbis ankaŭ sukcese oratoris pri Esp. en Trevisa. Novaj Esp. kursoj funkcias en Bologna kaj en la Popolaj Universitatoj de Genova kaj Padua. — Esp. Grupo en Cremona ricevis monhelpon de la Komereca Ĉambro.

**Hispanujo.** — Redaktoro de «Kataluna Esperantisto» en Barcelono, la konata s-ro Pujolà, batalas en la vicoj de la franca armeo.

**Serbujo.** — Del. de U. E. A. s-ro Berger faris paroladon kaj organizis Esp. kurson en Ĉuprija.

**Nederlando.** — La 11-an de Julio en Amsterdamo havos lokon kongreso de Holanda Esp. Federacio. — La gazeto «Soldatencourant», organo de le Nederlanda armeo kaj ŝiparo, regule publikigas Esper. kurson.

**Bulgarujo.** — S-ro Simov en Pleven gvidas Esp. kurson en la agrikultura lernejo.

**Ameriko.** — La Usonaj samideanoj multe laboras por la Kongreso en San-Francisko. — En Nov-Jorko funkcias speciala Esp. kurso por bankistoj sub gvido de s-ro Silbernik. — En Oakland s-ro D. E. Parrish paroladis pri «Esperanto kaj Milito». Samtota lekcio okazis ankaŭ en Worcester.


**Egiptujo.** — La Egipta Asocio Esperantista havis la plezuron akcepti kaj helpi al 35 aŭstraliaj kaj anglaj soldatoj-esperantistoj.

**Persujo.** — En Teherano komencis Esper. agadon s-ro Resser. Estas fondata Esp. Grupo.

**Japanujo.** — «Orienta Azio» komunikas, ke Japanujon vizitis s-ro M. Kostin, sekreta-

rio de Manĝuria Esperanta Societo (Ĥarbin), redaktoro de pedagogia revuo, sekretario de Pedagogia Asocio. S-ro Kostin alveturis kun sia edzino-esperantistino. Del. de U. E. A. en Ĥiroŝima, s-ro Takahaŝi, renkontis ilin en Simonoseki kaj gvidis dum la tuta vojaĝo tra Japanujo. S-ro Kostin faris priesperantajn lekciojn en Ĥiroŝima, Kobe, Tokio kaj Kanazoŭa. La agado de gesinjoroj Kostin estis vere sukcesoplena. — En granda urbo Nagoja fondiĝis nova Esp. Grupo.

K.



### Tria Cirkulero de la XI-a Universala Kongreso de Esperanto

en San Francisko, Aŭgusto 22-29, 1915.

La preparoj por la Kongreso estas jam preskaŭ finitaj. Jam de du jaroj niaj komitatoj prilaboris la preparojn por la VIII nacia Kongreso, kaj ni nur bezonis ilin plivastigi, por kunvenigi ankaŭ la XI-a Kongreson.

Neniam okazis Esperanta Kongreso inter tiom da allogaĵoj. La mirlando de Ameriko, Kalifornio, kun siaj gigantaj arboj, siaj vastaj valoj plenaj je tropikaj fruktarbaroj, riĉegaj minejoj, nemezureblaj fontoj de petrolo, kaj siaj altaj neĝkronitaj montaroj, vin akceptos. Vi estos bonvenantaj, karaj samideanoj, kaj ni ne permesos al vi bedaŭri vian alvenon.

Inter la distraĵoj preparitaj por la kongresanoj estos tuttaga ekskurso, trans la golfo de San Francisko, kies belecon egalas nur la fama „Ora Korno“ ĉe Konstantinopolo, preter la arbaroj kaj supren inter la montoj. Okazos unika balo sur la supro de monto, de kie la nekalkuleblaj multkoloraj lumoj de la Ekspoziciejo aliformiĝos en mirindan „Juvel-Urbon.“

Laŭ la „Faktlibro“, presita kaj dissendata de la Ekspozicia Kompanio, sabaton, la 28-an de Aŭgusto, oni festos kiel „Esperanto-Tago“ ĉe la Ekspozicio. Je tiu tago ĉiu Kongresano povos senpage eniri la Ekspozicion. Granda demonstracio de Esperanto okazos en tiu tago, kaj la vespero estos pasigata sur la „Zono,“ tiu senegala strato de amuzaĵoj kaj distrejoj provizita je kosto de preskaŭ 25 milionoj da spesmiloj.



La unuan dimanĉon de la Kongreso, Aŭgusto 22-an, okazos neformala kuniĝo de ĉiuj alvenintaj gesamideanoj en la fama „Ora Pordega Parko“, kies centoj da hektaroj da tropikaj kaj duontropikaj kreskaĵoj atestas en frapanta maniero la dolĉan klimaton de nia regiono.

La ĝeneralaj kunsidoj de la Kongreso okazos dum la sekvantaj tagoj, de la 23-a ĝis la 27-a de Aŭgusto inkluzive. Okazos ankaŭ la kelkaj kunsidoj de la Oka Kongreso de E. A. N. A. kaj de U. E. A. delegitoj. Specialaj fakaj kunsidoj estas en preparo, por ke nia kongreso havu kiel eble plej gravan kaj vastan kampon. La ĉefaj kunsidoj okazos en la vesperoj, por ke la kongresanoj havu tempon viziti la Ekspozicion tage.

Unu vespero estos okupata de senprepara oratora konkurso, esperanta komedieto, deklamaĵoj kaj kantoj.

Ni volas denove atentigi pri la bezono de frua aliĝo al la Kongreso. Partoprenantoj devus tuj mendi sian kongreskarton kaj rezervigi al si loĝejon. Dum la monato de Aŭgusto San Francisko gastigos pli ol 250 Kongresojn, kaj estus konsilinde fari siajn aranĝojn kiel eble plej antaŭtempe.

La kongres-insigno estas la plej bela kaj multekosta iam preparita por Esperanta Kongreso. La kongresanoj kaj helpkongresanoj ricevos ĝin senpage, kune kun ĉiuj dokumentoj de la Kongreso, bela gvidlibro tra San Francisko, ktp. Aldone al tiuj dokumentoj, la helpkongresanoj ricevos senpage la kolektojn da vidaĵkarto de San Francisko kaj la Ekspozicio (40 karto kun esperanta teksto) kaj provizon da Kongresaj markoj. Oni vidos, ke ĉiuj ricevos plenan valoron por sia kotizaĵo.

La adreso de la Kongreso estas simple:

*Esperanto-Kongreso,*

San Francisko, U. S. A.


### **Pri Ekspozicio de Esperantaĵoj ĉe la XI-a Universala Kongreso de Esperanto.**

*San Francisko, Aŭgusto 22-29.*

La Komitatoj por la XI-a Internacia Kongreso kaj la VIII Nacia Kongreso aranĝas grandan ekspozicion de esperantaĵoj. Ĉiuj eldonistoj de libroj, gaze-

toj, poŝtkartoj aŭ glumarkoj esperantaj estas petataj sendi al la Kongresa Komitato (D. E. Parrish, 1350 Pine St., San Francisco) materialon por tiu Ekspozicio. Prefere, ĉiuj objektoj kaj presaĵoj estu sendataj donace, sed se la senditaĵoj devas esti resendataj post la Kongreso, oni tion notu sur ĉiu peco. Se senditaj presaĵoj k. t. p. estas vendotaj por la profito de la sendinto, oni notu zorgeme prezojn kaj rabatojn. Ĉio sendita estos ekspoziciata en la urba Aŭditorio, kie ankaŭ la neesperantista publiko povos rigardi kaj aĉeti la aĵojn elmontratajn. Ni esperas, ke multaj firmoj uzos tiun ĉi senegalan okazon por montri siajn eldonaĵojn antaŭ la esperantista publiko de Ameriko.

San Francisko, majo 24-an.



### **Literatura Konkurso.**

Rememorante la malfeliĉajn tempojn, kiuj diskrevigas Esperantujon, kaj la mallongan periodon por preparado, kiun ni havis, la samideanoj certe pardonos al ni, se niaj aranĝoj por literatura konkurso ne saĝas tiel bonaj, kiel tiuj de antaŭaj kongresoj.

Ni decidis proponi tri ĝeneralajn kategoriojn, kiuj espereble troviĝos sufiĉe vastaj, por ke granda nombro da konkursantoj partoprenu. Tiuj kategorioj estas la jenaj:

1. Originala teknika aŭ beletristika prozaĵo, (ĉirkaŭ 5,000 vortoj.)
2. Traduko de mallonga rakonto neniam antaŭe esperantigita, prefere karakteriza rakonto de iu konata aŭtoro.
3. Poeziaĵo aŭ originala aŭ tradukita, juĝota laŭ ĝia Esperanta literatura valoro.

Por ĉiu kategorio ni dume povas promesi nur unu premion, 15 Sm. Povas esti, ke apartaj societoj kaj individuoj proponos duajn premiojn aŭ pli grandigos la premiojn per donacoj, k. t. p.

#### *Reguloj:*

1. La manuskripto devas ne montri la nomon de la konkursanto, sed nur devizon kaj la kategorian numeron.
2. La devizon kaj numeron oni ankaŭ skribu sur fermita koverto, entenanta la nomon kaj adreson de la konkursanto.
3. Manuskriptojn kaj kovertojn oni sendu al „Esperanto-Kongreso, San




Francisko“, kie oni akceptos ilin ĝis la lasta tago de la Kongreso, la 29-a Aŭgusto, 1915.

4. Dum la ferma kunsido la kongresa komitato anoncos la nombron kaj devizojn de la ricevitaĵoj manuskriptoj, kaj tuj poste forsendos ilin al kompetenta juĝantaro. La decidoj de la juĝantaro estos anoncataj kiel eble plej frue en la Esperantaj gazetoj, kaj la komitato tiam sendos la premiojn al la gajnintoj.

5. La premiitaj verkoj aperos unue en *Amerika Esperantisto*, post kiam ili ree fariĝos la propraĵo de la aŭtoroj.

6. La nepremiitaj verkoj estos resendataj, se oni aldonos, al la koverto enhavanta la adreson, la necesan postopagon.



## LETERO EL FRANCUJO.

La legantoj de «Ondo» jam scias, ke en Parizo estas fondita Esperanta komitato por la batalado kontraŭ la germana peresperanta propagando. En la komitaton eniris prezidanto de l' Akademio de Sciencoj, t. e. de la Franca Instituto, prof. Appel, akademianoj prof. Berthelot, princo Rolland Bonapart, Bonnier, prof. Bouchard, Carpentier, Richet, Desclandre, Guriel, duko Gramont. La komitato disponas monoferojn (monferis eĉ soldatoj) kaj ĝi jam eldonis en Esperanto 64-paĝan raporton pri la germanaj kruelaĵoj kun antaŭparolo de la konata verkisto Tristan Bernard. Nun estas preparata Esperanta libro pri la Belga neŭtraleco.

Oni multe rakontas pri la praktika uzado de Esperanto sur la batalkampo. Ekz. suboficiro Monbeig komunikas, ke, kiam lia taĉmento eniris ian flandran vilaĝon, li ne povis trovi iun vilaĝanon, parolantan france. Fine troviĝis flandra esperantisto kaj la demando estis solvita per Esperanto. Ruĝkrucano Morisse ankaŭ raportas, ke nur per Esperanto li sukcesis sin komprenigi al vundita malamiko.

Sufiĉe multaj esperantistoj glorigis sian nomon per rimarkinda kurageco: en la armeaj ordonoj oficiale estis notitaj herooĵoj de la mortigitaj; suboficiro Vernu, leŭtenanto Périard (vic-prezidanto de Auxerre'a Esp. Grupo), leŭtenanto Fauvart-Bastoul, leŭtenanto Sarrey (li pereis dum bajoneta atako) kaj kapitano Bayol. Ankaŭ estas oficiale notita la braveco de Buisson kaj s-ro Porée, kiun oni rekompence oficirigis. Per kruco de Honora Legio estas rekomp-


cita kolonelo Pillon, prezidanto de Esp. Grupo en Romans, Del. de U. E. A.

Kiel oni jam scias, la morto de kapitano Bayol sekvigis ankaŭ la morton de lia nekonsolebla vidvino. Nun mi povas sciigi, ke mortis sur la fronto nevo de kapitano Bayol, fervora ano de Beauvais'a Esper. Grupo.

La juna edzino de mortigita leŭtenanto Blangarin (redaktinto de «Internacia Socia Revuo») rakontas, ke lia edzo dum la antaŭmorta deliro multe parolis pri la kara Esperanto.

L. A.


Grénoble, Francj.



## TRA LA BATALKAMPO.

Heroe mortis niaj francaj samideanoj: Joffrin, prezidanto de Charenton'a Esper. Grupo, Patin, sekretario de Esp. Centra Federacio, Del. de U. E. A., Chappe, serĝento Vernu, Tardieu, Belhost, Cabassu, Bellon, Lemoine, Charles. Mortis Antverpena esperantisto Van Hulle, kunfondinto de «Suda Lumo». Kiel komunikas nia korespondanto el Grénoble, s-ro Bouche, sekretario de Esp. grupo «Paris-Nord», pereis en hospitalo, bombardita de germanoj.

En Siberio troviĝas aŭstria militkaptitoj—esp. Vizner kaj Sochansky (el Lwów), en Aŭstrio—L. D. Vasiljev, Petrograda Delegito de Univ. Esp. Asocio.



## BRITAJ ESPERANTISTOJ EN ARMEO, MILITSIPARO KAJ RUĜA KRUCO.

(Daŭrigo).

Krom la esperantistoj, kies nomaro estis presita en la Maja n-ro de «Ondo», enlistiĝis, t. e., enskribiĝis en la Britan militistaron, kiel komunikas «The British Esp.», la sekvantaj niaj samideanoj: J. Baron, J. Barr, A. Barry, J. Battersby, C. Birch, W. J. Birnie, H. Bryce, Cathro, eks-sekretario de Warrington'a Grupo Esperantista, korporalo F. Coole, korporalo J. Craven, korporalo Crowther, A. Davenport, F. Davies, J. Day, J. de Nil, J. R. Duxbury, leŭtenanto J. Elderkin, Delegito de U. E. A., E. C. Faraker, A. G. Farley, W. A. Gale, J. A. Grant, T. C. Green (speciale revenis el Buenos Ayres, Argentino), W. Hagon, sekretario de lastjara Brita Esper. Kongreso, serĝento Hampson, J. Harrison, J. Hilditch, Tabbitt, J. McCarthy, C. McGregor, aviadisto E. Meynell, J. Murray, W. Murray,



C. Nicholson, korporalo M. Palmer, sub-oficiro H. Pearce, korporalo P. Powell, E. Pratt, korporalo T. Prendergast, serĝento J. Reed, E. Roberts, N. Roberts, sekretario de Brita Esper. Kongreso, leŭtenanto J. Taylor, A. W. Thomson, prezidanto de Esper. Grupo en Bexby, H. Watt, A. Wilson, S. Wood.

## Bibliografio.

La tagiĝo. Kanto esperantista originale verkita de Antoni Grabowski. Muziko de

Baranski. Eldono J. L. Bruijn, Hago (Nederlando). Prezo Sm. 0,125.

Belega, vere artplena, poezio de A. Grabowski. Kio koncernas la muzikon, ĝi ne prezentas ion originalan kaj ne havas grandajn valorojn artajn, sed estas simpla marŝo aŭ marŝo-himno, cetere sufiĉe belsona. Du preseraroj enŝoviĝis en taktojn 10 (ne estas metita bekaro antaŭ noto si) kaj 11 (estas metita bekaro antaŭ sol anstataŭ ĝin meti antaŭ si).

N. Baĵenov.

## Tra nia gazetaro.

En la Maja n-ro de Geneva «*Esperanto*» aperis interesa artikolo de H. Hodler: «*La kritikistoj parolas*» kontraŭ la teorioj pri la rilatoj: 1) inter la politika potenco de ŝtato kaj ĝia intelekta produktado, kaj 2) inter kulturo kaj militista potenco:

«Por kontroli tiun aserton, sufiĉas konstati, ke tiel en la modernaj kiel en la antikvaj tempoj, multaj pensuloj kaj geniuloj naskiĝis en malgrandaj ŝtatoj ke ĉe grandaj ŝtatoj amaso da homoj havas tute burĝajn nenoblajn pensojn, same kiel en malgrandaj landoj. Kompreneble ekzistas la kontraŭa tezo, nome ke malgrandaj ŝtatoj estas pli favoraj al la homa kulturo ol la grandaj. Tiu aserto ne estas pli vera ol la antaŭa, (t. e. la aserto, ke la grandaj ŝtatoj estas speciale favoraj por pli intensa, pli larĝa, pli nobla pensado. K.) En grandaj landoj ankaŭ naskiĝis kaj vivis multaj geniuloj kaj utilaj servintoj de la homara progreso. Ekzistas malgrandaj landoj kun disvastigita kulturo kaj aliaj malgrandaj landoj en tute malsamaj kondiĉoj. Ekzistas landoj kun kulturita loĝantaro, kiuj raskis malmulte da gravaj epokfarantaj pensuloj, kaj ekzistas landoj kun malklera loĝantaro, kiuj kontraŭe donacis al la homaro kelkajn el ĝiaj plej indaj gloroj. La malo ankaŭ estas vera. Same trompemaj estas aliaj teorioj nur aludeblaj ĉi tie pri rilato inter kulturo kaj militista potenco. Geniuloj kaj alta kulturo ekzistis ĉe popoloj venkitaj sur la batalkampo, same kiel ĉe la popoloj venkintaj. Militistaj katastrofoj ofte tute ne malhelpis la floradon de fruktodona civilizaco. Eĉ gentoj subpremataj, dividataj, politike ne ekzistantaj, havas intensan intelektan vivon. La militista forto de la popolo dependas ne sole de si mem, sed de siaj malamikoj pli aŭ malpli multaj kaj de la fluoj de la politiko. Kial oni obstinus starigi rilaton inter aferoj nekompareblaj? Kontraŭ ĉiuj tiuj teorioj farataj laŭ la postuloj de la momento, ni armu nin per kiraso de skeptikeco. Nuntempe ili utilas al nenio, kaj morgaŭ ili malutilos al la starigo de pli bona ordo».

En la sama n-ro de «*Esperanto*» ni trovas artikolon sub la titolo: «*Nia movado dum la milito*». La aŭtoro skribas:

«En la komenco de la milito oni povus timi, ke tia katastrofo tre grave endanĝerigos la vivon de nia movado. Efektive, en la unuaj semajnoj, nia afero ŝajnis preskaŭ tute endormiĝinta. Tio tamen estis nur ŝajno. Post kelkaj semajnoj reaperis la ĉefaj naciaj Esp. gazetoj kaj aŭdiĝis vivsignoj. Oni iom post iom adaptiĝis al la milito kaj komencis reespero... Ne sole en la neŭtralaj, sed ankaŭ en la militantaj landoj la Esperantista vivo ne ĉesis. Ke ĝi estas malpli vigla ol en normala tempo, neniu miros, sed estas tamen ĝojiga fortsigno, ke en multaj urboj grupoj daŭrigas kunveni, paroladoj kaj kursoj okazas, Esperantaĵoj presiĝas... Ekzistas do nenia kaŭzo por malespero. Kontraŭe!»

La redaktoro de Esp. gazeto «*Holanda Pioniro*» en la Maja n-ro, retuŝante la «*Gajan Historion*» de «*La Verda Standardo*» (v. la Majan n-ron de «*Ondo*», pĝ. 68—69), prave indignas:

«Mortigi homon kaj poste amuziĝi pri tio, eble en Hungarlando estas tre vira kaj admirinda, al ni tio kaŭzos ĉiam abomenon, kaj ni tre bedaŭrus, se ni solaj havus tian senton».

Reaperis Pariza «*Le Monde Espérantiste*». Estas presita unu n-ro por la monatoj Aŭgusto 1914—Majo 1915. En ĝi ni legas:

«La samideanoj abonitaj al rusaj Esperantistaj gazetoj ne miru, ne ricevante ilin. La Poŝta Administracio de tiu-ĉi lando ne akceptas plu, dum la milito, presaĵojn kaj manuskriptojn redaktitajn en Esperanto».

«La Ondo de Esperanto» nun estas la sola Esperanta gazeto en Ruslando kaj rusa poŝto ĉiam akceptas ĝin, kvankam lastatempe ĝi estas redaktata nur en Esperanto. Niaj eksterlandaj abonantoj, interalie la Parizaj, multfoje konfirmis la ricevadon de «*Ondo*» kaj ni mem ĉiutage sendas kaj ricevas Esperantajn presaĵojn kaj manuskriptojn.

B. K.




**DANKO.***(El Lermontov).*


Por ĉio, ĉio dankas mi vin, Dio:  
 Por la turment' sekreta de l' pasi',  
 Por maldolĉec' de larm', venena vivo,  
 Por la de miaj geamikoj kalumni',  
 Por venĝ' de malamik', mi dankas ĉiel  
 Por ĉio, kio trompis en viv' min...  
 Aranĝu do denun al mi vi tiel,  
 Ke mi nelonge jam plu danku vin.  
 (18140). *Trad. Pikiĥavskij.*

\* \* \*

Jen flugas la birdo en blua larzuro,  
 Sin banas en lumo kun ĝoj' kaj plezuro.  
 Kaj sonas de alte dankpreĝ'  
 Al Di' kaj Mondreĝ'.  
 Kaj pensi ne volas la bird', ke momento...  
 Kaj eble ĝi falos al ter' en turmento,  
 Kun vundo mortiga en kor',  
 Kun morta stertor'.  
 Kaj prava ĝi estas, ke pensi ne penas  
 Pri morto apuda, dum vivo festenas,  
 Triumfas kaj reĝas tra spac',  
 Sur tera surfac'.

*I. Lubjanovskij.***Trövuĵ de craj mondoj.***De Leopold Staff.**Al memoro de Paul Verlaine.*

Kun koro grene bona, juna kiel floroj,  
 Poet' vivis senhejma, bird' amanta ondojn...  
 Lin ĉarmis maro, amo kaj disiĝ-sonoroj,  
 Lin logis oraj mondoj, retrovitaj mondoj..

**EL NOTLIBRO DE A. ĈEĤOV \*).**

Se vi alvokas antaŭen, bonvolu nepre montri la direkton, la precizan direkton «antaŭen. Konsentu, ke, se vi, ne montrante la direkton, ĵetos tiun vorton samtempe al monaĥo kaj revoluciulo, ili ekiros tute malsaman vojon.

Estas malbone, ke ni penas plej sagace solvi la plej simplan problemon kaj tiamaniere ni komplikigas ĝin eksterordinare. Oni devas serĉi la plej simplan solvon.

Ne ekzistas lundo, ne cedonta sian lokon al mardo.

Pura, kvankam lin drinka vizitis manio,  
 Li multe kulpis... Pagis al Sorta kolero  
 Per jaroj hospitalaj kaj pun' de karcerio,  
 Kie li kun perforto paciĝis kaj Dio.

Sed jen li maljuniĝis... Kiel ŝipo, maron  
 Sopirante, li pentris ĉe si per orumo  
 Seĝon, kie doloron li ŝanĝis je lumo,  
 Liton, pordon, fenestron, kaj lampon mal-


karan.

Kaj trovis l'oran mondon—l'infan-malkov-

rulo...

Li marnaĝis en ĉambro, ŝajnanta kabino...  
 Per rev' lin ĝoje portis al ora insulo  
 Lulanta, kiel maro, bonfaranta vino...

*El lingvo pola per verso silabika trad.*  
*Cz. Kozłowski.*

**Kun ŝi mi hieraŭ promenis...**

Kun ŝi mi hieraŭ promenis  
 Tra l'kampoj en flora odor',—  
 La lun' sur ĉielo nin benis  
 Kaj vekis la amon en kor'.

Kun ŝi mi hieraŭ petolis  
 Sur herbo ĉe l'akva lazur',—  
 Pri amo al ŝi mi parolis,  
 Pri kisoj, pri viv' kaj plezur'.

Kaj ŝi min aŭskultis atente,  
 Ridetis naive al mi...  
 Komprenis la lingvon silente:

La lingvon de l'ama pasi'...  
 Kaj larmoj ekfluis torente...  
 Kaj amo naskiĝis ĉe ni...

*Feliks Hiller.*

Bona homo hontas eĉ hundon.

El notlibro de maljuna hundo: «Homoj ne manĝas restaĵojn kaj ostaĵojn, kiujn elĵetas la kuiristino. Ho, malsaĝuloj!»

Nia universo, eble, troviĝas en dento de iu monstro.

— Ĉu vi deziras manĝi?

— Ho, ne, male.

\*) La notlibro estis trovita post la morto de A. Ĉeĥov. Ni ekstraktis kaj tradukis Esperanten nur parton de la notlibro.



Al paseredzino ŝajnas, ke la pasero ne pepas, sed kantas tre bone.

Pligrandiĝis ne la nombro de l'nervaj malsanoj kaj nervuloj, sed la nombro de l'kuracistoj-nervspecialistoj.

Ju pli kultura, des pli malfeliĉa.

Oni donas al la avo manĝi la fiŝon, kaj se li ne estas venenata kaj restas vivanta, la fiŝon ekmanĝas la tuta familio.

Korespondo. Juna fraŭlo revas dediĉi sin al la literaturo, li ĉiam skribas pri tio al la patro, finfine li forlasas la oficon, venas Petrogradon kaj sin dediĉas al la literaturo—li fariĝas cenzuristo.

La kapitano instruis al sia filino la fortikaĵarton.

Vojaĝi kun la edzino Parizon estas same kiel vojaĝi Tulon kun sia samovaro \*).

Opinio de profesoro: la ĉefaĵo estas ne verkoj de Ŝekspir, sed la komentarioj.

Viro sen lipharoj estas simila al virino kun lipharoj.

Malsano: li havas hidroterapiion.

Recenzisto N. vivas kun aktorino X. Estas benefico. Oni ludas teatraĵon malbonegan kaj oni ĝin ludas sentalente, tamen s-ro N. devas laŭdi. Li recenzas mallonge: «La teatraĵo kaj la beneficantino havis grandan sukceson. La detaloj sekvas morgaŭ». Je la morgaŭtago li vizitas s-inon X. Ŝi malfermas la pordon, lasas sin kisi kaj enbraki, sed kun venena mieno diras:—la detaloj sekvas morgaŭ!

En la stalo odoras malbone: antaŭ 10 jaroj tie pasigis nokton falĉistoj kaj la odoro restis ĝis nun.

La morto estas terura, sed pli terura estus la konscio, ke vi vivos eterne kaj mortos neniam.

La universitato disvolvas kiun ajn kapablon, ankaŭ la malsaĝecon.

Estas festata jubileo de modesta persono...

\*) Tulo estas centro de samovara industrio.

La festantoj simple utiligis la okazon sin montri, laŭdi unu la alian. Kaj nur en la fino de l'jubilea festeno oni rimarkis, ke la jubileulo ne estis invitita: li estis forgesita.

S-roj A. kaj B. vetas. S-ro A. vete formanĝas 12 kotletojn, s-ro B. ne pagas la veton kaj eĉ ne pagas por la kotletoj.

Sur ŝia vizaĝo estis nesufiĉe da haŭto: por malfermi la okulojn, ŝi devis fermi la buŝon—kaj inverse.

Perfidinta edzino similas grandan, malvarman kotleton, kiun oni ne volas tuŝi, ĉar ĝi jam estis tenata en la manoj de iu alia.

S-ro X. dum la tuta vivo parolis kaj skribis pri la malboneco de l'servistaro kaj li mortis, forlasita de ĉiuj, krom lia lakeo kaj kuiristino.

Knabino admiras sian onklinon: ho, ŝi estas tre bela, bela, kiel nia hundo!

Se vi deziras havi malmulte da libertempo, faru nenion.

Oni diras: finfine la vero triumfos; sed ĝi ne estas vero.

Kiam ni jam havas infanojn, ĉiun nian malbonaĵon kaj emon al la kompromisoj kaj burĝeco ni pravigas tiel: «ni faras tion por la infanoj».

80-jara maljunulo diras al 60-jarulo: «hontu, junulo!»

Korespondanto de gazeto mensogis, sed al li ŝajnis, ke li skribas veron.

Se vi timas la solecon, ne ebziĝu.

La ruso havas la solan esperon: gajni ducent mil rublojn.

Siojorino plendas: mi skribas al la filo, ke li ĉiusabate ŝanĝu sian tolaĵon. Li respondas: kial sabate? kial ne lunde? Mi respondas: nu, bone, estu lunde. Sed li ree demandas: kial lunde? kial ne marde? Li estas honesta, bona homo kaj tamen li turmentas min terure.

Saĝulo emas lerni, malsaĝulo emas instrui (proverbo).



Tiu sinjoraĉo estas tre singarda: eĉ la gratulleterojn li sendas rekomendite, kun resendota kvitanco de l'adresito.

Li estas tre enamiĝema; ĵus konatiĝinte kun fraŭlino, li tuj fariĝas kaprikorno.


Kiun profesion havas via edzo!—Li trinkas ricinoleon.

Ĉiutage li mem vomigas sin—pro la bonfarto, laŭ konsilo de sia amiko.

En kalkulo, prezentita de la hotelmastro estis interalie: «Cimoj—15 kopekoj».

S-ro N. sonĝas, ke li revenas el eksterlando kaj ke en Verĵolovo \*) oni postulas limimposton por lia edzino, malgraŭ lia protestado.

Tradukis K.



## TRAVIVAĴO DE RO-ŜO.

(Ne publikigita).

Foje mi vizitis en Buffalo, urbo en Usono, ankoraŭ ne vizititan de mi vinfirmo, kies ĉefo afable min akceptis, sed samtempe diris, ke li estas tre okupita, kaj, cetere, devas tuj iri sin razigi.

«Ĉu vi intencas razigi?» mi demandis. «Jes, ĉu tio vin mirigas?» li respondis. «Ho, tute ne», mi diris, «ĝi nur memorigas al mi amuzan fabelon».

«Aŭskultu! ĉu vi scias vere belan fabelon, de mi ĝis nun ne aŭditan? tiukaze restu unu momenton kaj rakontu!»

Mi demandis, ĉu la sinjoro parolas la fran-

can lingvon, kaj li respondis nee. «Bone», mi diris, «mi tradukos».

La fabelo tiom amuzis lin, ke li petis min reveni je la tria horo, kaj fine donis al mi tre gravan mendon; dum sep jaroj, ĝis mi forlasis Usonon, ni faris bonajn negocojn kune.

Jen tiu, kion mi rakontis:

Franca markizo, iam vojaĝante per vagonaro, devis halti en tre malgrava urbeto por atendi dum duono da horo alian vagonaron. Profitante la okazon, li eniris, por sin razigi, ian budon, kie raziĝis laboristoj. Razisto venis, ĉirkaŭmetis al la markiza kolo buŝtukon, kraĉis sur sapon, ŝmiris liajn moŝtajn vangojn, kaj razis. La markizo iom miregis, sed tamen silentis; poste li petis pelvon kun akvo kaj mantukon.

Pagonte la kalkuleton per kvar spesdekoj, li demandis: «Aŭskultu, amiko mia, ĉu estas en via razejo kutimo kraĉi sur sapon, kaj poste ŝmiri al viaj klientoj la vizaĝon?» «Tute ne», respondis la razartisto, «tion mi faris nur hodiaŭ en via speciala honoro».


«Sankta Virgulino!» ekkriis la markizo, kiu estis bona katoliko, «kion do vi faras al la aliaj klientoj?»

«Ho, al ili, respondis senhezite la razistaĉo, mi tutsimple kraĉas rekte en la vizaĝon, kaj poste frotas per la sapo!»

La markizo ridegis, eliris, aĉetis en librovendejo, ekzempleron de (por legi dum la veturado) «Travivaĵoj de Ro-Ŝo». (vendata por la profito de Esperanto ĉe la blinduloj) kaj eniris kupeon.

Anglujo.

R. Sharpe.



## ITALUJO KAJ ESPERANTO \*\*).

Italujo aliĝis al kontraŭgermana koalicio. Kaj se en kontraŭgermana flagaro radiis ĝis nun ĉiuj koloroj krom la verda—nun ĝi eniris per itala standardo.

Sur ŝildoj de kontraŭgermana legio reliefiĝadis multaj emblemoj—nun ili akceptis ankaŭ kvinpintan italan stelon.

Esperantista koloro, esperantista stelo!

Mi rememoras, ke foje en finna vagonaro mi konversaciis kun najbaro. De temp' al tempo li okulumis mian insignon kaj fine demandis:

— Vi portas italan stelon, ĉu ne vere? Kial?

Mi klarigis signifon kaj miavice informiĝis:

— Al mi ŝajnis, ke itala stelo estas sespinta.

— Sinjoro,—diris mia kunparolanto, kaj indigno sonis en lia voĉo,—seŝpinta estas la aŭstria stelo.

Do, la idista stelo estas aŭstria!

Tamen ni prenu ne la okazajn koincidojn. Efektive lingvoj itala kaj esperanta devenas el la latina. Esperanto estas internacia en XX jc., la itala estis por aristokratia kaj plutokratia de XVI-XVII kaj la latina praestis la mondlingvo. Samdevenaj, la itala kaj Espe-

\*) Limstacio.

\*\*) Eksprompta parolado, farita dum kunveno de Kieva Societo Esperantista.



ranta, povus tamen tre diferenci nun, ĉar latineco de Esperanto spertis tro multe da influoj, trairante diversgentajn ŝanĝojn dum centoj da jaroj. Sed malgraŭ tio la «artefarita» Esperanto tiom similas la «natureca» lingvon italan, ke tiu lasta, se oni ĝin adaptus al internaciaj bezonoj, ne povus esti alia ol la unua. La eco de l'itala—vokalaj finaĵoj—ĉu ne estas en Esperanto, ne estinte tamen karakteriza por la latina? Aŭtoro de Esp-o ne konis italan prononcon de latino, eble pli ĝustan ol la germana-slava, tamen en Esp-o ni renkontas ne *lego* sed *leĝo*, kiu respondas al *lex*, *legis*, *legi* laŭ itala deklinacio de tia latina vorto ktp. Kiom oni riproĉis la malnaturecon de korelativa tabelo, kaj jen la vorto *kie*, tiu vere kompromisa formo, kreiĝinta en penso de D-ro Zamenhof, retroviĝis en friula dialekto de lingvo itala!

Kiam vi legas italan tekston, vi ĝin komprenas... tre malbone, sed tio kreas en vi instinktan malkontentecon, kvazaŭ vi *devus* senti nenian malfacilaĵon. Similajn pretendojn vi ne havas al iu ajn alia lingvo, ne lerninte ĝin. Kontraŭe, Esp-on por italoj plifaciligas ĝia simpleco \*).

Dum Krakova Kongreso, pli ĝuste post la ferma kunsido, mi havis plezuron manĝi kun s-ro Devjatnin. Meze de la vespermanĝo li ekmemoris, ke li forgesis deklami dum la kunsido la speciale verkitan versaĵon, kaj iu petis lin fari tion en nia rondo. Post fino de l'deklamado iu sinjoro salte leviĝis de proksima tablo kaj alkuris al la aŭtoro, ekscite parolante, ke li ĉion komprenis. Ni ne miris similan deklaron, ĉar restoracio estis plena de samideanoj. Sed klariĝis, ke tiu sinjoro estas itala komizovojaĝisto kaj li komprenis versan parolon, deklamatan por esperantistoj. Ni poste pli ol horon promenis kun li, kaj evidentiĝis, ke pri Esp-o li nur aŭdis iam.

Ankaŭ en Kievo, en Negociista ĝardeno, foje al stelportanto sin prezentis italo kaj post longa interparolado klarigis sian konatigemon:

— Mi parolas nur itale kaj france, ĉi-tie mi estas fremdulo. Hejme mi spertis, ke esperantisto min povas kun penemo kompreni, kaj nun mi en fremdaj urboj povas paroli itale.

Simileco de lingvoj havas sekvojn, bonajn kaj ne.

Kiel klarigis s-ro Stromboli, «italoj ne kredas, ke ceteraj popoloj same facile lernas Esp-on kiel ili», kaj tio haltigas propagandon.

\*) Mi legis eĉ pri pli kurioza fakto, sed ne povis ĝin kontroli: ke italo el iu dialektregiono ne komprenas alian dialekton, sed ĉiuj komprenas Esp-on.

Tamen esp-isto en Italujo ne sentas malpli da oportunaĵoj ol en aliaj landoj.

Al bonaj sekvoj apartenas, kompanse, ankaŭ la facileco de kelkaj propagandaj rimedoj. La esp-aj paroladistoj kolektadis en malgrandaj urbetoj po 300-400 aŭskultantoj, kaj paroladis sen tradukisto; la kursoj donas bonegajn rezultojn. Ekzemple, doganistoj, instruatoj de kap. Saccani, post dek tagoj flue parolis kun holandano el Java, laboristoj post kelkaj tagoj korespondas kun alilandaj kamaradoj.

Iom da konkretaĵoj.

Italian lingvon reprezentas en Akademio prof. Meazzini.

Gvidaj centroj de itala esp-ismo troviĝas en Genova, Bologna kaj Trieste dank'al tri nomoj, konataj al ĉiuj esp-istoj: inĝ. Stromboli («Vulkano»), s-ro Aŭhilo Tellini kaj Prof. D-ro Ghez.

Tri asocioj dividis inter si laboron, kio estas imitinda por ĉiuj landoj. Taskon de aplikado prenis, kompreneble, U. E. A. havanta nunamomente ĉirkaŭ kvardek Delegitoj, la internan organizon prizorgas Itala Esperanto-Asocio kun filioj en 33 urboj, la instruadon kaj propagandon ĉefe akcelas Itala Katedro de E. Inter siaj membroj ĝi posedas plej spertajn instruantojn kiel profesoroj Ghez, Carolfi, Bianchini, Cossaro, aranĝas kursojn kaj paroladojn. Italoj ŝatas oratorojn, la bonaj ne mankas inter profesoroj kaj docentoj de la Katedro, urbetoj kuŝas proksime unu de alia, resume paroladoj prosperas. Dum iu monato de 1914 Katedro aranĝis 32 paroladojn, ofte po kelkaj samtage, faritaj en diversaj urboj de unu homo. La kursanoj, laŭ itala kutimo, post fino donacas alia gvidinto memoraĵon.

Italujo havis 4 tutlandajn kongresojn. Ĉe du lastaj, en Verona 1912 kaj Milano 1913 oni parolis ekskluzive en Esperanto. La V, preparita en Bologna por pasinta jaro, estas pro milito transportita al 1915-a Italoj estas sufiĉe multnombraj ĉe la internaciaj kongresoj. Bedaŭrinde Italujo, kiel Rusujo, ĝis nun ne gastigis la Universalan E. Kongreson. Sole la 4 Kongreso de katolikaj esperantistoj kun internacia pilgrimado al Sankta Trono havis lokon en Italujo. Dum tiu Kongreso (1913), farinta bonegan propagandon inter milionoj da homoj en la tuta mondo, unue sonis esp-a kanto en Vatikano, kiam ĥoro de papa gvardio kantis «Ni volas Dion». Katolika esp-ismo ĝenerale havas en Italujo sian plej grandan apogon, pro agado de L. K. M. prof. Giambene.

Kiel oni scias, la du tronejoj de Romo, la Vatikano kaj la Kvirinalo, estas kon-



traŭulaj. Tamen pri nia lingvo iliaj ĉefuloj esprimis egale favorajn opiniojn. La Papo estas beninta Esperanton kaj la Reĝo en aŭdienco, donita al s-ro Privat, pruvis sian interesiĝon kaj aprobon. Li bone legas Esp-e.

Italujo posedas tri gazetojn: «Itala Esperantisto» prezentas tipan «oficialan organon», «L'Esperanto» kontraŭe havas riĉan programon kun aparte interesaj lingvistikaĵoj, «Vegetarano» estas la unua internacia organo de vegetarismo.


Italaj gazetaj ne malofte lokigas propagandajn artikolojn kaj kursojn. En «L'Illustrazione Ligure» esp-aĵoj iam okupis trionon de teksto, laborista «Avanti» en nuna jaro presis artikolojn de parlamentano Morgari, kiu ne estas sola Esperantano inter la deputitoj.

Esp-on uzas, plue, s-to por Ĥina Neografio, stenografiistoj (gazeto «La Palestra Stenografica»), la granda «Società Dante-Alighieri», entrepreno, kiu multegon faras por itala kulturo. Dank'al loka propagando Esp-o trovis simpatian ĉe Filozofia Kongreso en Bologna, 14. Int. Kongreso de Kontraŭalkoholismo en Milano akceptis ĝin kiel kvaran oficialan

lingvon por raportoj kaj debatoj, Kongreso por akcelo de fremdula movado konfirmis kelkajn rezoluciojn pri aliĝo de hoteloj, kluboj k. s. al U. E. A., pri dissendo de esperantaj reklamoj kaj gvidlibroj. Tiuj lastaj jam ekzistas en kelkaj urboj. Notinda estas sukceso de reklama servo ĉe Genova Ekspozicio de Industrio, Marismo kaj Higieno. Fine, la enketoj montris aprobon al E. de multaj unuaranguloj de Italujo. Parolojn de filozofo Roberto Ardigo ni metu sur la unuan lokon. Ili estas vere ardigaj paroloj.

Ankoraŭ dum neŭtraleco italoj atingis principan akcepton de Esp. ĉe Ruĝa Kruco kaj multon peradis inter kontraŭulaj landoj. Centoj da informoj estis ricevitaj pro sindona laboro de samideanoj en Italujo. Ni estas feliĉaj, ke nun ne sole esperantistoj de Italujo laboras kune kun ni, sed ankaŭ la popoloj rusa kaj itala ekbatalis en la samaj vicoj, ĉar la ambaŭ agadoj, Esperantista kaj kontraŭgermana, laŭŝajne diversaj, havas la saman finan celon—defendon de l'kulturo.

V. Traĉevskij.



## EN ANGULO DE L' MILITO.

De Harald Clegg.

Feliĉa Anglujo, kiu ankoraŭ ne vidis la mizerojn de la nuna tragedio. Estas tute kontraŭe en la malgranda parto de l' tero, nuntempe en posedo de l' belgoj, ĉar tio, kio ne estas bombardita, estas forlasita al la militistoj. Tie funkciadas la ambulanco «Esperanto № 1» \*).

Jen kelkaj bildoj de la scenoj, en kiu nia ambulanco figuras:

Estas mateno tre venta kaj malvarma, ni devas iri al Dunkirk kun medicinistoj kaj por serĉi flegistinojn. Koto kaj vojtruoj ĉie (mi jam de longe malesperis pri purigo de la aŭtomobilo). Malrapida progreso pro tio, ke la vojo estas mallarĝa, kaj troviĝas sur ĝi granda nombro da soldatoj, belgoj, francoj, araboj, Marokanoj kaj eĉ negroj el Kongolando: militaj vagonoj de ĉiu speco, kanonoj, ankaŭ pafiloj (*mitrailleuses*) tirataj ĉiu per du hundoj. Subite ni aŭdas «*Halte la*» kaj antaŭ ni staras gardisto kun minacanta mieno (kaj bajoneto). Estas necese diri la pasvorton. Ni denove ekiras kaj

trapasas vilaĝon, kie estas stacidomo. Ankoraŭ amaso da soldatoj. Ni vidas ankaŭ kelkajn rifuĝantojn, viroj, virinoj kaj infanoj kun siaj posedaĵoj volvitaj en tolo aŭ eĉ simple kunligitaj per ŝnuro. Ili atendas vagonaron por porti ilin suden, ĉar iliaj hejmoj estas neteneblaj. Doloriga spektaklo! Preter la vilaĝo la vojo estas rekta, kaj ni povas iri pri rapide. Sur unu flanko estas la kanalo kaj ni vidas tie Amerikan naĝantan hospitalon; tre praktika rimedo por trakti la vunditojn kaj samtempe ilin transporti. Sur la kanalo estas anglaj ŝipejoj kun kanonoj, kaj mi estas tre kontenta rekoni la gajajn vizaĝojn de anglaj maristoj. Fine Dunkirk, interesa urbo kun malnovaj domoj, kurbaĵoj kaj grandaj doko.

.....  
Mi leviĝas je la 8-a, matenmanĝas, kaj demandas, ĉu estas laboro por nia ambulanco. Ne; do mi estas libera por iri en la aŭtomobilejon por atendi la maŝinon. Subite mi aŭdas pafon, sed mi ne atentis, ĉar tio estas ordinara afero. Tamen mi aŭdas ankoraŭ pafadon kaj mi elkuras por esplori. Ĉiuj rigardas supren (mi ankaŭ), kaj

\*) La fotografaĵo de l'ambulanco estis presita en la marta n-ro de «Ondo» sur la 1-a paĝo.



mi vidas tre alte unu aeroplanon. Estas kruco de speciala desegno pentrita sur la suba parto, kaj estas facile rekoni ĝian naciecon. Ĉirkaŭ ĝi je diversaj distancoj estas blankaj buloj da fulmo. Estas la ŝrapnelo, kiun oni pafas kontraŭ ĝi. Ni aŭdas la sonon de la eksplodoj, sed nenio trafas ĝin, kaj ĝi sendifekte ĉirkaŭflugas. Sur la tero tamen estas alia afero, ĉar la aviadisto faligas bombojn, kaj kelkaj homoj estas mortigitaj aŭ vunditaj. Nun en la sudo aperas du aliaj aeroplanoj. La malamiko vidas ilin ankaŭ, kaj diskrete forflugas. Ili estas belgaj.

Nia ambulanco staras antaŭ la pordo de la hospitalo, ĉar ni devas porti vunditajn soldatojn al la plej proksima stacidomo. Ĉio estas preta, la benkoj por la sidantoj kaj la portiloj por la kuŝantoj. Jen venas ses; ili povas marŝi, sed kelkaj nur per la helpo de servistoj. Ĉe unu mankas kruro, la dua ŝajne perdis brakon, kaj la kapo de la tria preskaŭ ne estas videbla kaŭze de bandaĝoj. Ili estas junuloj kun agrablaj vizaĝoj, kaj oni povas diri, ke korpe ili *estis* tre bonaj specimenoj de homoj kaj indaj je kiu ajn raso. (Mi min demandas, kiu diablo ordonis ilian nunan staton). Tamen ili estas gajaj kaj ridas kaj ŝercas. La teruroj, kiujn ili spertis, ne povas detrui la kuraĝon nek la spiriton de tiuj herooj. Ili eniras pene la ambulanco, kaj oni disdonas ĉokoladon kaj cigaredojn kun bondeziroj. La du aliaj soldatoj estas pli grave vunditaj. Unu estas belga, la alia germana. Ili kuŝas sur la portiloj, zorge kaj varme kovritaj. Ambaŭ estas palaj, kaj unu ŝajne dormas. Kiu estos ilia sorto? Ni malrapide aliras la stacidomon, kie la vunditoj estas transdonitaj por daŭrigi la kuracadon en aliaj pli oportunaj urboj.

«Je la dua horo estu preta por iri al la fronto». Bone, ĉio estos preta. Je la dirita horo «Esperanto № 1» kaj alia ambulanco ekiras, ĉar por tiaj ekskuroj oni veturas duope. La pluvo falas verŝe, kaj sur la vojoj akvo kuras kiel rivero. Tamen tio estas pli agrabla ol dika koto, kiu kaŭzas


subitajn flankglitojn. Duonvoje io okazas por plifeliĉigi nin! Kotsirmilo sur la antaŭo komencas malfiksiĝi, kaj rompita ŝraŭbo necesigas ĝin demeti. Do, antaŭen sen ŝirmilo, kaj necesas teni la buŝon kaj okulojn fermitaj! Ni trapasas Oost Dunkerque kaj alvenas en Nieuport, kie estas dometo, kiun oni aranĝas kiel hospitalon por soldatoj el la tranĉeoj.

Nieuport *estis* urbo, nun ĝi estas kolekto de ruinaĵoj kaŭze de bombardoj. Domoj sen tegmentoj, grandaj truoj en muroj, faligitaj kamentuboj, pecoj de ligno, fero kaj brikoj en nepitoreska konfuzo. Kavoj sur la vojoj montras la lokon de eksplodiĝintaj kuglegoj; kaj aliaj similaj signoj de homa sovaĝeco. Jen la aspekto! Ni trovas vunditojn kaj ilin forportas. Je duonkilometro ni denove haltas apud subtera hospitalo (*poste de Secours*) flanke de la vojo. Tie ni vidas la flagon de la Ruĝa Kruco. Oni alvokas nin, ĉar soldato ĵus estas grave trafita. Ni atendas, dum oni faras la unuajn zorgojn kaj preparas portilon. Subite mi aŭdas laŭtan fajfon (ŝajnas al mi kiel la krio de papago) kaj super la ambulanco tuj sekvas la sonego de eksplodo. Estas ŝrapnelo. Nenion ni vidas kaj nenio estas tuŝata. Aliaj ŝrapneloj venas, sed ĉiu ne tiel proksima. Post dek minutoj la paciento estas preta, kaj ni daŭrigas la vojon al la hospitalo.

Tiuj ĉi skizoj montras la specon de laboro, kiun faras nia ambulanco, kaj mi povas certigi al la donacintoj, ke ilia mono estas utile elspezita. La aliaj taskoj estas egale helpaj al la Ruĝa Kruco. Ni iras en Calais por serĉi medicinistojn, al apuda vilaĝo por ĉerko, kun mortintoj al preĝejo je kvar kilometroj, al aliaj hospitaloj por serĉi provizaĵojn por la vunditoj, kaj aliajn servojn por la malsanuloj nia ambulanco faradas.

Nun mi estas denove en Anglujo, kaj la ĉefa afero, kiu okupas mian penson, estas la aĉeto kaj forsendo de la Ambulanco «Esperanto № 2», multe bezonata por la Ruĝa Kruco.

(„Brit. Esper.“ № 124).





## «KIAMANIERE VIVAS NATURAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO, KIEL ILI RIĈIĜAS KAJ KONSERVAS AU PERDAS UNUECON».

(Temo donita de privat-docento E. Privat al stud. G. Bakradze en Varsovio por profesora ekzameno).

(Fino).

Ĉion diritan de ni pri la vivo de lingvoj naturaj, ĉion oni povas rilatigi ankaŭ al Esperanto, almenaŭ nun, en ĝia 25-jara relativa lingva plenaĝiĝo, krom ĝia naskiĝperiodo, plena de vera miraklo.

Esperanto posedis vortaron kaj strukturon-gramatikon, sed ne havis la spiriton, almenaŭ en la tempo kiam D-ro Zamenhof ankoraŭ ne verkadis originale, antaŭ ol li pensis en sia lingvo, antaŭ ol li aperigis unuan, plenan de maldolĉaj sentoj kaj de poezia doloro, «Mian penson». «Esperanto memkompreneble unuafoje viviĝis en animo de unu homo, ĝia kreinto»—pensas ni ĉiuj sen interpretoj.

Sendube, ĝis la lingvo konsistis el vortaro kaj gramatiko, ĝi kvazaŭ estis seka malviva lingvaĵo, enhavanta nur vivajn elementojn, ekzemple, la vortoj, konjugaciaj formoj, pruntitaj el vivlingvoj. Kiam, en kiu m-o-m-e-n-t-o ĝi komencis vivi en menso de l'majstro? Oni povas supozi nur, ke, se ĝi ne vivis reale (dum embria stato, ĝi almenaŭ «duonvivis») malfacile estas rimarki la komencan momenton de ĝia «ekviviĝo». Plie, havis lokon ne ekviviĝo, nek eĉ viviĝado, sed daŭranta vivo. Efektive, estas rimarkinde, ke inter pli gravaj kaj evidentaj signoj de l'vivo troviĝas transiraj gradoj: unuan lingve-vivan ekzistaĵon—«Mian Penson» antaŭiris meditado de l'majstro en juna lingvo, kies formoj jam estis almenaŭ duonvivaj, ĉar ili ja estis prenitaj el la vivaj lingvoj; siavice tiun ĉi unuan «originalaĵon»—la meditado, antaŭiris la pretigado, verkado, arta farado de la lingvo, kio ankaŭ—mirinda fenomeno!—estis kvankam eta, sed *natura procedo de lingva vivo!* Tion pruvas la rimarkinda fakto:—ke doktoro Zamenhof samtempe pensis en Esperanto kaj arte preparis ĝin (vidu artikolon de Baronino Hankel en «Universo», kie ŝi rakontas kiel majstro ekzemple ekzamenis necesecon de artikolo la).

Kaj fine, tiun ĉi procedon de vivo—la pretigadon de Esperanto—antaŭiris jam pretaj vivaj elementoj, eltiritaj el vivaj lingvoj. Per genia lerteco D-ro Zamenhof kaptis tiujn lingvajn vivelementojn, artiste kombinis, komponis, enblovis la spiriton kaj tiamaniere donis la komencon al nova unika viva organismo. Poste, de siaj unuaj tagoj, tiu ĉi nova organismo komencis dis-

volviĝi, fortikiĝi kaj,—simile al konsekvenca disvolviĝo kaj kresko de apartaj organoj de la korpo dum embria stato,—evolucii diversajn formojn (esprimoj, parolturnoj, derivaĵoj) por enampleksigi diferencajn pensojn kaj ideojn.

Foje, sencele malferminte ian kartvelan libron, mi okaze tralegis, ke oni lastatempe aplikas natursciencajn metodojn en lingvistika scienco. Se efektive oni faras tion, oni prave kaj trafe apliku tiujn metodojn rekte al Esperanto, kiu, devenante plejparte de romana-germanaj lingvoj, montris ne nur genealogian principon sed—vera miro!—pruvis la principon de biologia filogenio: el ĉio kion ni supre observis pri originperiodo de Esperanto, ni povas konkludi, ke en sia individua vivado—arta verkado kaj unuaj meditoj de majstro: jaroj 1878—1887 (ontogenio) ĝi ripetis vivon gentan—kelkjarcenta kaj intersekva vivado de romano-germanaj lingvoj (filogenio)\*.

La uzado de l'unuaj ĝiaj tagoj komencis «pluviviĝadi» Esperanton ĝis hodiaŭ, kiam ĝi «plene viviĝis» kun animo milda, delikata—la poezio. El tiu ĉi «procedo de viviĝado» 35-jara — estinto (1878 — 1912)—estonto—neeble estas fiksi ĉiun tagon, ĉiun horon, montrante apartajn ŝtupojn de kontinua konsekvenca procedo,—neble eĉ por la plej granda geniulo! Ĝi estas mistera sekreto de la vivo, de la surtera vivo.

Eble, pere de malvarma scienca analizo estus tamen determineblaj iaj psikikaj faktoroj, estus plenumbla evidenta fikso de l' apartaj vivmomentoj, de sekundoj de tiu vivo-fluado, simile al iaj «mutacioj» de l' fama holanda botanikisto, fariĝus ebla analizo de ecoj kaj esenco (la naturo) de tiuj sekundoj—sed por la esperantistoj tio estas tute negrava. «Post longa migrado sur dorna la voj', post longa batalo, post maldolĉa turment', ili estas kontentaj, feliĉaj kaj fieraj de tio, ke Esperanto jam estas vivanta! La lingvo vivas kreskas, fortikiĝas, floras kaj kantas. Ĝi kantas per mirinde belaj, paradize harmoniaj sonoj de pompa, brilanta reĝo de l'

\*) La aŭtoro nun laboras super interesa «historia gramatiko de Esperanto».



esperanta poezio pri nobla kaj bela idealo de l' esperantismo:

«La lingvo benata montriĝis al ni  
Mirinda donaco ĉiela:  
Per amo al hejmo, patrujo, naci',  
Ni flamas en koro fidela,  
Kaj same fidelaj al hejma altar'  
Ni sentas nin filoj de l'tuta homar'!»

En kiu lingvo povas soni same, la jenaj versoj:

«Kiam Staĥon tero prenis,  
En la kampo vent' orgenis,  
Plende kantis la tremoloj,  
Sonoretis-kampanoloj...»

Aŭ

«Al ni branĉetoj verdaj pendos,  
Narcisoj supren sin etendos,  
Kaj per falanta flor' tilia  
Kovriĝos kara kapo via.  
Mi vin per blankaj rozoj kronos,  
Per miozotoj blue zonos,  
Ornamos per filik' magia,  
Kaj mondon faros pli radia.»

Nuntempa esperantisto jam ne fanfaronu pri siaj animaj suferoj pro Esperanto. Li havas firman konvinkon pri la pozitivaj ecoj de la lingvo: sufiĉas poezio de Antoni Grabowski, kies grandega signifo ĝis nun ne estas konsciita nur tial, ke esperanta literaturo bedaŭrinde ne havas pure-literaturan kritikiston kun talento egala al tiu de l'eminenta poeto.

Gloron al malnovaj esperantistoj de l'unuaj tagoj, al la spirita energio de anaro «de plej frua hor'!» Ili ja laboris sen tiaj apogoj. Vere, ili estis fanatikuloj, frenezuloj!.. Herooj kaj oferaĵo por la sensenta homaro. Superaj mensoj, varmegaj puraj koroj, ili kun plena rezignacio, propravole sin kondamnis al la spirita limigo, oferdonante sian tutan vivon, «al la devo ordonanta» kaj elspezante ĉiujn siajn spiritajn fortojn por disvastigo kaj prediko al mondo de unu sola veraĵo, kiu nun estas tiel nekomplika kaj elementa. Sed jen demando: ĉu tiu ĉi idolo—la homaro—iam lernos juste kaj sincere taksi tiujn viktimojn sin ĵetintajn homojn laŭ iliaj meritoj?..

G. Bakradze.

Varsovio.

## DIVERSAĴOJ.

### Grava alvoko.

S-ro Georg Davidov el Saratov entreprenas eldoni *ruslingvan* serion de broŝuroj pri aplikoj de Esperanto:

- 1) *Esperanto kaj la Blinduloj.*
- 2) » » » *Vegetarismo.*
- 3) » » » *Pacifismo.*
- 4) » » » *Kristanaj Unuiĝoj.*
- 5) » » » *Virinoj.*


Mi jam sendis al li la problindulan kaj pri-vegetaran materialon kaj penados kiel eble plej baldaŭ kolekti ankaŭ pri tri ceteraj temoj.

Sed por ke ĝi estu vere valoraj propagandiloj de nia movado mi petas la gesamideanojn ĉiulandajn sendi al mi sciigojn, opiniojn kaj deziresprimojn pri la diritaj demandoj. Uzonte la materialon por presado, mi citos la nomon de la persono, kiu sendis tion aŭ alian. Tia solidareca internacia verkado havos pli da signifo.

La broŝuron pri la blindula demando s-ro Davidov intencas eldoni 30 paĝe, kaj dezirante prezenti al la rusa legantaro tre seriozan kaj sciencan verkon, li volas aldoni al la cetera dokumentaro, «*Nomaron de ĉuispecaj verkoj Braille-presitaj por blinduloj aperintaj de la jaro 1887-a ĝis la 1914.* Jam li kolektis la titolojn de pli ol 100 diversaj verkoj. Sed li deziras nepre kompletigi la nomaron kaj petas sciigi pri ĉiuj verkoj, ekzistantaj por blinduloj-esperantistoj, ankaŭ pri unikaj verkoj, t.e. pri manskribitaj kaj ekzistantaj nur en unu ekzemplero por la uzo de blinduloj laŭ jenaj nformoj: Titolo? Aŭtoro? Paĝoj? Formato?i Jaro? Tradukinto? Eldonejo? Tenejo?

Li volonte presus ankaŭ nomaron de naciaj unikaj manskribitaĵoj por blinduloj.

Dankege mi ricevus tiajn sciigojn de bonvoluloj diverslingve kaj petas gazetojn esperantajn kaj naciajn represi la alvokon. F-ino Anna Sharapov, ĉe P. Birukoff, Onex, près Genève, Suisse.



### ERARO.

La redakcio ricevis de f-ino Helmi Drezen (Revalo) le sekvantan leteron: «En Novembra № de «Ondo» (1914 j., pĝ. 175) aperis sciigo pri mia morto. Kvankam mi estis malsana pli ol 6 monatojn, tamen mi vivas kaj esperas resaniĝi somere».

La sciigo estis liverita de nia kunlaboranto s-ro Mikli. Ni tre bedaŭras pri la eraro, sed samtempe ni tre ĝojas, ke la sciigo estis erara kaj ni sincere deziras, ke f-ino Helmi Drezen plene resaniĝu.

Redaktoroj { B. Kotzin.  
S. Obruĉev.

Редакторъ-издатель А. А. Сахаровъ.

Типографія Т-ва Рябушинскихъ. Москва, Страстной бульв., Путинковский пер., соб. домъ








## HOLDEN FRATOJ

liveras Botojn,  
Suojn, Sanda-  
lojn, Panto-  
flojn, Kaŭ-  
ĉukajn Suojn,  
Strumpojn kaj  
Strumpetojn.  
Ĉiuj eksklu-  
zive laŭ la tipo  
„Naturformo“



## HOLDEN FRATOJ

3. Harewood Place, Oxford Circus, London, W.  
Katalogoj senpage. Oni parolas Esperante.

12-12

## SAINVILLE (FRANCUJO).

S-ro Buret deziras negoci kun fabrikanto de ma-  
ŝintrikiloj. Sendi katalogojn plej baldaŭ.

## САИНВИЛЬ (ФРАНЦИЯ).

Г-нъ Буре жаелаетъ завести торговля сношения  
съ фабрикантомъ вязальныхъ машинъ. Каталогъ  
просить выслать немедленно.

## Sekaj legomoj.

Mi deziras rilati kun  
grava serioza send-  
isto kiel ĝeneralaj  
agentoj por tuta  
Francujo. Referencoj laŭvole. Ni povus havigi gran-  
dan vendadon. Pago kontraŭ konosmento. Skribu  
per Esperanto, franca aŭ angla lingvo al

## GASSE & DUCLOS.

33, Jac. Louer.

Le Havre.

## Сухія овощи.

Мы желаемъ завести тор-  
говля сношения съ боль-  
шимъ солиднымъ экспор-  
теромъ; состоимъ гене-  
ральными агентами для всей Франции. Референция  
по усмотрѣнiю. Мы могли бы доставить громадный  
сбытъ. Плата по коносаментамъ. Пишите по-эспе-  
ранто, французски или англійски по адресу:

## ГАССЪ и ДЮКЛО.

33, Jac. Louer (Жакъ Луэ).

Le Havre (Гавръ).

## Moskva Librejo Esperanto.

(Moskvo, Lubjanskij projezd, 3).

senprokraste plenumas mendojn por ĉiuj  
libroj esperantaj kaj rusaj.

La ĉefa tenejo de la libroj:

Devjatin. Plena verkaro. 2-a vol. — 1 r. (1,06 Sm.)

» » 3-a vol. — 65 k. (0,65 Sm.)

A. A. Saĥarov. Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj.  
Kolekto da artikoloj pri internacia lingvo Espe-  
ranto en esperanta kaj rusa lingvoj. Pr. 60 kop.  
(0,63 sm.)

Kabe. En Malliberejo, de E. Ĉirikov — 10 sd.

K. Bein. Patroj kaj Filoj, de Turgenev — 1 rublo  
(1,06 sm.)

Каръ и Панье. Эсперанто въ 10 уроковъ, пер.  
Тиличьева, — подъ ред. А. А. Сахарова — 20 к.

В. Н. Десятницъ. Ключъ къ учебнику Каръ и  
Панье: Эсперанто въ 10 уроковъ. Ц. 15 к.

Zamenhof. Plena Esperanta-rusa vortaro — 80 k.

Т. А. Щавинскій. Полный курсъ международного  
языка Эсперанто, 2-е изд. Ц. 60 коп.

Ĉefeĉ. Ключъ Эсперанто. Ц. 2 к.

» » 100 экз. Ц. 1 р. 40 к.

A. Rivier. En Rusujo per Esperanto. Pr. 60 kop.  
(sm. 0,63).

V. Devjatin. Artista Biblioteko. Pr. 20 kop.  
(2п. 0,21).

B. Kotzin. Historio kaj teorio de Ido. Pr. 50 kop.

B. Kotzin. Du rakontoj de A. Ĉeĥov. Pr. 10 kop.  
(Sm. 0,10).

A. Saĥarova. Kaŭkaza kaptito de L. Tolstoj.  
Pr. 10 kop.

Hershel Hall. La premiito. Pr. 5 kop. (sm. 0,05).

Ив. Ширяев. Тра la loko ensorĉita. Pr. 3 kop.  
(sm. 0,03).

A. Saĥarov. Superforta ambicio. Pr. 20 kop.  
(sm. 0,22).

A. Saĥarov. Signifo de akciaj societoj por Esp.  
movado. Pr. 5 kop. (Sm. 0,05).

Ruslanda Adresaro. Prezo 40 kop. (sm. 0,40).

A. Ajspurit. Internacia krestomatieto kun laŭ-  
artikola vortaro seslingva. Pr. 15 kop. (Sm. 0,15).

П. Стоянъ. Необходимое объ Эсперанто. Ц. 3 коп.

P. Stojan. Ornitologia vortaro. Pr. 1 rubl.

P. Stojan. Rusa - Esperanta poŝvortareto. Pr.  
20 kop. (Sm. 0,20).

M. Sidlovskaja. Princo Serebrjanij, de A. Tol-  
stoj. Prezo 1 rubl. 60 (sm. 1,60) afrankite.

G. Davidov. Titolaro de Esper. verkoj tradu-  
kitaj el rusa literaturo. Pr. 10 kop. (Sm. 0,10).

T. Ŝeavinskij, Salajro, de N. Timkovskij. Pr. 20 k.

M. Aleksandrov. Konvenaĵoj. Komedieto de Bi-  
libin. Pr. 10 k.

Orienta Almanako. Literatura Aldono al „La Ondo  
de Esperanto“. Diversaj tradukoj el la lingvoj  
araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hinda, ĥina, japa-  
na, kartvela, lezgina, sanskrita kaj tatara. pr. 70 k.

A. Saĥarovъ. Основной курсъ языка Эсперанто.  
5 коп.

A. Андреевъ. Международный языкъ Эсперанто.  
Его настоящее, прошедшее и будущее.